ISSN 2072-5825

# Espero Katolika




Numero 7-9/2013

Julio-Septembro 2013

**JARKOLEKTO 110 - N. 1104-1106 - Julio/Septembro 2013**
*Finpresita la 03.09.13* — Finito di stampare il 03.09.13

**Sur la kovrilo:** *La pilgrima Domo en Kalwaria Zebrzydowska (Pollando). En la fama pola pilgrimloko okazis la ĉi-jara Kongreso de IKUE (v. p. 53).*

## ENHAVO

**1700 JAROJ POST LA EDIKTO DE MILANO (313-2013)**
Historio de la dokumento, kiu estigis **religian toleron** en la romia Imperio 43

**KIA ESTU BONA LITURGIO?**
**KIEL ONI PLEJ BONE GLORAS DION?**
**Prelego pri liturgio dum la KELI-kongreso 2012 - Unua parto**
Tradicio: konservemo kaj progresemo 47
Vorto/racio kaj mistero/sento 48

**KREU FOJE SILENTON ĈIRKAŬ VI**
**Meditiga** teksto el "Ŝanco por feliĉo" 49

**HISTORIAJ NOTOJ PRI KALWARIA ZEBRZYDOWSKA**
Unu el la pli vizitataj **pilgrimlokoj** en Pollando 50

**ORIGINO DE LA KALVARIOJ** 52

**LA IKUE-KONGRESO 2013 "NIA 66a"**
**Kroniko** de la tagoj en Kalwaria Zebrzydowska 53

**IKUE-RENKONTIĜO EN MARIANKA ĈE BRATISLAVA** 59

**FUNEBRE** 60

**Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio**
**Telefono kaj fakso: +39-06.39.63.81.29 - Elektronika poŝto:** <ikue@ikue.org>
**TTT-paĝoj:** http://www.ikue.org - http://www.esperokatolika.org * **Dissendolisto:** <ikue@yahoogroups.com>
**UEA-konto "ikue-v" * Banko:** "Unione internazionale cattolica esperantista" Roma, Italio
IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

*Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo* - Registrazione presso il Tribunale di Roma
n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

*Presejo* - Tipografia
ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

*Respondeca Direktoro* - Direttore responsabile
Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00012 GUIDONIA RM, Italio
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

**Espero Katolika**, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de **I.K.U.E.**
**INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA** internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidanto:** Giovanni Daminelli **- Vic-Prezidantino:** Marija Belošević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Ĝenerala Sekretario/Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Estrarano por ekumenaj rilatoj:** Stefan Lepping. **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli, Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.


# 1700 JAROJ POST LA EDIKTO DE MILANO (313-2013)

*La Edikto de Milano estis letero subskribita de la imperiestroj Konstanteno kaj Licinio, respektive estroj de la Okcident-Romia Imperio kaj de la Orient-Romia Imperio, per kiu ili proklamis religian toleron en la tuta Imperio. La letero estis disvastigita en la jaro 313, iom post la konkludo de la persekutado fare de Diokleciano. De tiu momento ĉesis la persekutoj kontraŭ la kristanoj. D-ro Giovanni Daminelli prezentas la Edikton en ĝia 1700-a datreveno.*

Por paroli pri ĉi tiu Edikto, mi startos de Milano, precize de ĝia Katedralo.

Rigardante la Katedralon de Milano, ni rimarkas sur ĝia fasado kvin bronzajn pordojn.

La unua pordo maldekstre estas nomata “Pordo de la Edikto de Milano”. Ni rigardu ĝin detale.



Ĝia desegno estas dividita en plurajn panelojn kun bronzaj barilefoj. Ĉe la bazo estas la portretoj de la ses Episkopoj de la diocezo de Milano antaŭ la Edikto *(Anathalo, Caius, Castrilianus, Calimerus, Mona kaj Mirocles).*



Centre de la supra trabo estas la statuo de la imperiestro Konstanteno.

La du vicoj de la centraj paneloj montras 10 bildojn pri la mortigo de Sanktuloj martirigitaj antaŭ la Edikto, *(Nazarus, Celsius, Sebastianus, Victor, Felix, Nabor, Gervasius, Protasius, Sofia kaj ŝiaj tri filinoj: Agape, Pistis kaj Elpis).* Preskaŭ ĉiuj estis martirigitaj en Milano ekcepte *Sebastianus* (mortigita en Romo, sed li estis milanano), kaj Sofia kaj ŝiaj tri filinoj, kiu tamen estas iamaniere ligitaj al la nomo de Konstanteno, ĉar li konstruigis en Konstantinopolo la Bazilikon de Santa Sofia.

La 10 flankaj paneloj montras: sube kvar epizodojn de la vivo antaŭ la Edikto; centre, resuman frazon de la Edikto kun la du imperiestroj Konstanteno kaj Licinio. En la kvar supraj paneloj estas epizodoj de la vivo post la Edikto.

Ni vidu pli detale la du panelojn de la Edikto de Milano (indikitaj per ruĝa ovalo en la maldekstra fotografio).

En la maldekstra, flanke de la bildo de Konstanteno, estas la skribaĵo:

*Renkontiĝinte en Milano, mi Konstanteno Aŭgusto kaj mi Licinio Aŭgusto juĝis, ke inter ĉiuj faroj utilaj al la homoj kaj respektemaj al la diaĵo, antaŭ ĉio*



*necesas plenumi ĉi tion:*

(la skribaĵo daŭras en la dekstra parto, flanke de la bildo de Licinio)




*doni al Kristanoj kaj al ĉiuj plenan liberon, ke ĉiu rajtu praktiki la religion, kiun li volas, por ke, kio estas dieca en la ĉiela sidejo, sin turnu al ni kaj al ĉiuj niaj regnanoj pacigita kaj favora. [Edikto 313].*

Do, de tiam ĉesis la persekutoj kontraŭ la kristanoj en la Romia Imperio. Ĉi tiu edikto estas grava, ĉar ĝi markas la komencon de la libereco de la moderna homo.

Por kompreni la Edikton de Milano, nomatan ankaŭ Edikto de Toleremo aŭ Edikto de Konstanteno, ni devas prikonsideri la tiamajn historiajn cirkonstancojn.

Dudek jaroj antaŭe, en la jaro 293, la imperiestro Diokleciano por pli bone protekti la Romian Imperion dividis ĝin unue en du partojn: la Orienta Imperio, kaj la Okcidenta Imperio kaj poste li dividis ĉi tiujn ankoraŭ en aliajn du partojn, unu regata de imperiestro nomata *aŭgusto* kaj la alia de imperiestro nomata *cezaro* (vic-aŭgusto).

Entute la romia imperio estis dividita en kvar tetrarkejojn. Iliaj ĉefurboj ne estis en la centro, sed sufiĉe proksimaj al la landlimoj por pli rapide interveni kontraŭ la malamikoj.

La *aŭgusto* de la Orienta imperio estis Diokleciano mem kun ĉefurbo Nikomedio (la nuna İzmit en Turkio) kaj la *cezaro* estis Kajo Galerio kun ĉefurbo Sirmio (latine: Sirmium; la nuna Sremska Mitrovica en Serbio).

La *aŭgusto* de la Orienta Imperio estis Massimiano kun ĉefurbo Milano, kaj la *cezaro* estis Kostanco Kloro (patro de Konstanteno) kun ĉefurbo Aŭgusta Treverorum (la nuna Treviri, Germanio).

En la jaro 305 Diokleciano kaj Massimiano abdikis kaj la du *cezaroj*, Galerio kaj Konstanco Kloro, iĝis *aŭgustoj*, kiuj elektis siavice la du novajn *cezarojn*.

Post la morto de Konstanco Kloro en la jaro 306 kaj de Galerio (memoru ĉi tiun nomon) en la jaro 311 okazis ĥaoso, por konkeri la regadon unue de la okcidenta kaj poste de la orienta imperioj. Fine, en la jaro 312 kun la batalo de Ponto Milvjo apud Romo, Konstanteno venkas kontraŭ Massenzio kaj iĝas *aŭgusto* de la tuta okcidenta imperio. La postan jaron Licinio iĝas *aŭgusto* de la tuta orienta imperio, do fine restas nur du imperiestroj.

La batalo de Ponto Milvjo estas fama, ĉar oni rakontas, ke antaŭ la batalo Konstanteno havis vizion de la signo de Kristo kun la skribo: “Per ĉi tiu signo vi venkos”. Pro tio li metis tiun signon sur la insignojn de sia armeo antaŭ la batalo.



Temas pri la tiel nomata “Kristmon”.


En la jaro 313 por starigi bonajn rilatojn inter la du Imperioj, Konstanteno proponas geedziĝon inter sia fratino Konstanca kaj imperiestro Licinio. Ĉi-lasta akceptis kaj la du imperiestroj renkontiĝis en Milano por la nupto. Dum ĉi tiu renkontiĝo ili proklamis ĉi tiun edikton kaj sendis ĝin al ĉiuj provincestroj.

Verdire ne temis pri vera edikto, sed

pri reskripto de la tiel nomata Edikto de Tesaloniko proklamata de Galerio en la jaro 311.



Galerio estis tre aktiva persekutanto de la kristanoj (li inspiris la grandan persekuton de Diokleciano), sed, kiam li estis mortonta, li komprenis, ke per la persekutoj li atingis la kontraŭan celon: pro la persekutoj, la nombro da kristanoj, anstataŭ malkreski, plimultiĝis. Pro tio, antaŭ ol morti, li haltigis la persekuton kaj proklamis edikton por doni al la kristanoj la rajton konfesi libere sian kredon, sed sub la sola kondiĉo, ke ili preĝu por la imperiestro. En ĉi tiu dekreto li aperas kiel venkito.



Male Konstanteno, kiu estis la inspirinto de la Edikto de Milano, vidis la oportunecon doni al la kristanoj la plenan liberon. Al la Edikto de Galerio li aldonis aliajn dispoziciojn. En la dua parto de sia reskripto, li ordonis, ke estu redonataj la havaĵoj konfiskitaj al la Eklezio. La plejmulto de ĉi tiuj havaĵoj konsistis el preĝejoj, kunvenejoj aŭ aliaj konstruaĵoj. Sed ĉi tiuj havaĵoj havis novajn proprietulojn, pro tio la dekreto deklaras, ke ĉi tiuj devas esti repagataj de la ŝtata trezorejo.

En la teksto oni ripetas plurfoje, ke la libero ne estas donita nur al la kristanoj, sed ankaŭ al la aliaj, sed oni ne diras, kiuj estas la aliaj. Certe ne la paganoj, ĉar ili jam estis liberaj. La romianoj estis toleremaj pri la religioj de la submetitaj popoloj kaj ankaŭ pri la hebrea religio. Pro tio oni povas subteni, ke la Edikto estis precipe por la Kristanoj.

Kial do la kristanoj estis persekutitaj? Komence la kristanismo estis konsiderata kiel sekto de la hebrea religio, ĝi do ne estis religio pro tio ĝi estis kelkfoje persekutata de kelkaj lokaj guberniestroj. Sed en la tria jarcento, kristanismo jam estis disvastiĝinta ekster la hebrea popolo, kaj aliflanke, la religio de la romianoj iĝis preskaŭ monoteisma, ĉar ĉe ili superregis la kulto de Jupitero tre respektata en Romo sur monteto Kapitolo. La penso de la imperiestroj estis: Jupitero ĉiam protektis la Roman Imperion kaj faris ĝin granda; se ni konsentus la kulton de Kristo, Jupitero povus forlasi nin. Sed jam la mortonta Galerio komprenis, ke Kristo estas tro forta, pro tio la persekutoj estas senutilaj.

Konstanteno konstatis, ke li venkis dank' al Kristo. En sia parolado okaze de la koncilio de Nicea (jaro 325) li diris: *"Ekde kiam mi elektis Kriston, mi ĉiam venkis. Okazis neniu malpliigo de la Roma Imperio, eĉ dank' al mia agado, ĝi fartas pli bone ol antaŭe. Mi eliminis ĉiujn miajn konkurantojn kaj reunuigis ilin sub mi, mi redonis la pacon al la Imperio, plu ne estas uzurpatoroj, nek intercivitanaj militoj. Ĉi tio montras, ke mi bone elektis, kaj ke ni ne bezonas Jupiteron, sed Kristo estas la Dio, kiun ni bezonas*".




Fakte Konstanteno en la jaro 324 militis kontraŭ Licinio, venkis kaj reunuigis la Imperion (la postan jaron li ordonis la mortigon de Licinio kaj de liaj familianoj).

Sed kio okazis post la Edikto? Vere la

Imperiestro protektis la novan religion, sed ankaŭ entrudiĝis en ĝiajn aferojn. Ekzemple li kunvokis la Koncilion de Nicea.

Estas rimarkinde, ke, en la jaro 380, imperiestroj Graciano, Valentiniano kaj Teodozio (la Romia Imperio, post Konstanteno, estis denove dividita) promulgis la Edikton de Tesaloniko, kiu deklaras la kristanan Nicean Kredon oficiala religio de la Imperio; pro tio oni rekomencis persekutojn, ĉi-foje kontraŭ arianismo kaj paganismo. Sed tio estis kontraŭ la Edikto de Milano, kiu donis al ĉiuj la liberon praktiki sian religion.

Komenciĝis longa epoko de reciproka entrudiĝo inter politiko kaj religio. Por la Katolika Eklezio, tio daŭris ĝis la jaro 1871, kiam la novnaskita Itala Regno konkeris kaj nuligis la Papan Ŝtaton. Tio kaŭzis gravan suferon kaj kontrastojn en la kristana mondo, sed kiel diris Papo Paŭlo la 6-a en 1971, okaze de la centjariĝo de tiu evento: "*Ni devas danki la dian providencon pro la liberigo de la Papa Ŝtato el ĉiuj surteraj zorgoj*".

La Edikto de Milano estigis novan epokon en la vivo de la Eklezio, sed ne forigis la persekutojn.

Oni diras, ke en la lasta jarcento la nombro de la martiroj pro la fido estas multe pli granda ol tiu de la jarcentoj antaŭ la Edikto de Milano. En multaj partoj de nia mondo estas kristanoj, kiuj perdas sian vivon por ne rezigni je sia fido. Sed ankaŭ en nia okcidenta mondo, kies radikoj estas kristanaj, la kristanoj spertas aliajn formojn de martirigo estigitan de kulturo kontraŭkristana. Pro tio la kristanoj suferas ekskludon, mokadon, falsajn akuzojn, diskriminaciojn. Tio ne devas mirigi nin. Kiel en la tempoj de la romia imperio, ni proponas alian Dion, kiu kontraŭstaras la dion de ĉi tiu mondo. Ni memoru la vortojn de Jesuo en la parolado de la ebeno: "*Beataj vi estos, kiam oni vin malamos, riproĉos kaj malestimos vian nomon kiel malbonan, ĉar vi kredis je la Filo de la homo*", (Luk 6,22) kaj poste Li aldonas: *"Ve al vi, kiam ĉiuj homoj parolos bone pri vi, ĉar tiel same faris viaj patroj al la falsaj profetoj"* (Luk 6,26).

Ĉi tiuj vortoj komprenigas al ni, ke ni estas sur la bona vojo kaj tio devas feliĉigi nin.

Por fini, mi volas reveni al la pordo de la katedralo de Milano por montri al vi signifan kuriozaĵon. Mi diris, ke sube estas la portretoj de ses episkopoj de Milano. Tiu de episkopo Castrilianus havas sur la genuoj rubandon kun la nomo de la aŭtoro de la pordo, skulptisto Arrigo Minerbi. Poste estas indikitaj du jaroj laŭ la romiaj ciferoj: MCMXXXVI kaj MCMXLVII (1936 kaj 1947).



La unua estas la jaro, en kiu oni mendis al li la pordon; la dua estas la jaro, en kiu li finis sian laboron.

Kial pasis 11 jaroj? Ĉu vere li devis labori 11 jarojn por realigi ĝin? Ne kredeble! La kialo estas, ke li estis hebreo kaj pro la italaj rasismaj leĝoj de la jaro 1938 li devis rifuĝi por savi sin, forlasante sian laboron, kiun li redaŭrigis post la dua mondmilito.

Ŝajnas, ke la aŭtoro mem, iom ironie, enskribis la du datojn por montri la kontraston inter la Edikto de Toleremo, kies celebron oni mendis al li, kaj la maltoleremo de la realo, kiun li mem devis suferi.

Post 1700 jaroj, la Edikto de Toleremo ankoraŭ atendas sian plenan aplikadon.

*Giovanni Daminelli*

Prelego pri liturgio okaze de la interkonfesia diskuto dum la KELI-kongreso en Zöblitz, Germanio, 2012

# KIA ESTU BONA LITURGIO? KIEL ONI PLEJ BONE GLORAS DION?

*Liturgio ja estas la vorto por komuna, publika preĝado kaj glorado de Dio, kiu okazas laŭ certa ordo, depende de la tradicio kaj kutimoj.*

## UNUA PARTO
## Tradicio: konservemo kaj progresemo

Ĉiu homo staras en tradicio. Eĉ la unuaj kristanoj, kiuj ja estis en la komenco de nia religio, tamen staris en la tradicio de la juda maniero, glori Dion. En la fino de la evangelio laŭ Luko estas skribite, ke post la ĉieleniro de la Sinjoro Jesuo, la disĉiploj estis konstante en la templo, glorante Dion. Oni do povas supozi, ke la origina kristana maniero, kiel oni gloras Dion, havas sian radikon en la juda templokulto. La apostoloj certe ne nur rakontis al la popoloj, al kiuj ili iris, pri la faroj de Jesuo, sed ankaŭ instruis al ili preĝi kaj glori Dion. Se oni komparas la manierojn kanti kaj preĝi el malnovaj judaj kaj kristanaj tradicioj, estas iu simileco, kiu montras, ke ĉio fontas el unu sama fonto. Tamen estas ankaŭ sufiĉe granda diverseco, pro diversaj evoluoj en malsamaj kulturaj cirkonstancoj.



*Preleganta Stefan Lepping*

Tradicio nome ne estas nur io, kio venas rekte el la ĉielo, aŭ heredite de la prapatroj, iam venis el ĉiela revelacio. Fakte, la templo de Jerusalemo, la psalmoj, la manieroj festi aŭ celebri Diservon en la juda religio, ja baziĝas parte sur la revelacioj al Moseo, al Davido k.a. Sed ankaŭ oni ne subtaksu la homan influon! Ankaŭ antaŭ Moseo kaj Davido estis arto, kiel ludi harpon, fluton aŭ trombonon (laŭ Gen 4,21 jam en la oka generacio post Kaino, ties pra- pra-...nepo Jubal estis la patro de ĉiuj, kiuj ludas harpon kaj fluton). Kaj tiun arton oni ekuzis kaj metis en la servon de la nova (aŭ malnova? Purigita!) religio.

En la origino de nia kristana religio, krom la komuneco kun la tradicia juda religio, ekestis novaj preĝoj, himnoj k.a., ĉar pere de Jesuo, ekestis iusence nova maniero preĝi al Dio, jes, eĉ ekestis nova maniero kompreni Dion. Oni preĝas ekde tiam per Jesuo, kaj ankaŭ al Jesuo, kiel Dio: komparu la alparolon de Tomaso, kiam li post la resurekto rajtas meti siajn fingrojn en liajn vundojn: “Mia Sinjoro kaj mia Dio!”. Do tiu nova teologio bezonis novajn preĝojn, kiuj ekestis ekde la unua tempo (kaj el kiuj kelkaj troviĝas jam en la Biblio!), sed ankaŭ dum la jarcentoj.

La pludonado de la kristana religio de generacio al generacio okazis kaj okazas per tradicio. Estas seninterrompa ĉeno de homoj, kiuj vivas en la unu sama Spirito de Dio, en la unu sama kredo heredita de Jesuo per la apostoloj. Tiuj kristanoj konsistigas unu eklezion, unu vivan korpon de Kristo (kp. 1Kor 12,27), trans la limoj de landoj kaj tempoj. Tradicio do tute ne estas nur rigida transpreno de malnovaj moroj kaj pensmanieroj. Ĝi estas trezoro viva, kiu evoluas kaj pliriĉiĝas per la kontribuo de

ĉiu generacio, jes de ĉiu unuopa kristano. Jesuo diras pri la tradicio, kiu jam estis dum lia vivo: "Ĉiu skribisto, disĉipligita en la regnon de la ĉielo, similas al dommastro, kiu elportas el sia trezorejo objektojn novajn kaj malnovajn" (Mat 13,52). Estas ĝuste kaj grave, ke ĉiu generacio interpretas la hereditan tradicion kaj kreas novajn verkojn, ĉu preĝajn, ĉu muzikajn, ĉu artajn, kiuj povas kelkfoje ankaŭ riĉigi liturgiojn.



*Orgenludo estas por Stefano profesia okupo*

En tio, oni devas lasi sin gvidi de la Sankta Spirito, kiu, estante ĉiam la sama, tamen ĉiam estas nova: en la ĉielo ne ekzistas malnoviĝo! Laŭ mi, en bone komprenita kristana religio estas ambaŭ elementoj: kaj la estimo al sanktaj tradicioj, kaj la entuziasmo de tio tute nova, kio estas la Regno de la ĉielo, kiu komenciĝas, kiam homoj serioze eksekvas Jesuon kaj eklasas sin gvidi de la Sankta Spirito. Mi por tio citas el la evangelio laŭ Luko, 5-a ĉapitro (v.37): "Neniu enverŝas novan vinon en malnovajn felsakojn; ĉar alie la nova vino krevigus la felsakojn, kaj ĝi mem elfluus, kaj la felsakoj detruiĝus". (v.38): "Sed novan vinon oni devas enverŝi en novajn felsakojn". Tiu citaĵo ja signifas, ke tradicioj (malnovaj felsakoj) ne sufoku la entuziasmon de la Regno de Dio, ili ne katenu ĝin. Tia entuziasmo, kiu ne emas enligi sin en tradiciajn strukturojn, estas pli karakteriza por junuloj. Tamen, kelkfoje komenca entuziasmo post kelka tempo laciĝas (kiel fajro, kiu forbrulis ekz. gren-ventumaĵon), ĉar ĝi ne havis sufiĉe da substanco, aŭ, laŭ alia bildo, ne sufiĉe profundajn radikojn; eble ĝi troe malrespektis la multfoje elprovitan saĝecon de la maljunuloj. Kaj efektive, ĉe Luko Jesuo ankoraŭ daŭrigas la parabolon, dirante: (v.39) "Kaj neniu, trinkinte malnovan vinon, deziras novan; ĉar li diras: la malnova estas preferinda". Por mi, estas signifohava fakto, ke Jesuo mortis en la aĝo de ĉirkaŭ 33 jaroj, do Li nek plu estis sensperta junulo, nek Li estis jam maljunulo, kiu lernis vivi kun la skandalo, ke la mondo estas tiel malperfekta. Kaj Li faras ekvilibron kaj interpaciĝon de tiu ŝtorma junula progresemo, kaj tiu elprovita maljunula konservemo.

## Vorto/racio kaj mistero/sento

En kristana Diservo, same kiel en juda, la Vorto havas grandan rolon. Ne temas nur pri iu nebula religia sperto, kiun oni ekhavus, farante ekstazon per muziko kaj danco, kiel en aliaj paganaj religioj. Estas nur unu flanko de la kristana vero, ke Dio estas nekomprenebla mistero: Esenca trajto de nia religio estas, ke Dio, la kreinto de ĉio videbla kaj nevidebla, kiu sola staras super ĉio kreita, parolas al ni, homoj, deziras kontakton kaj interligon kun ni. Li volas esti nia Dio, ja eĉ nia patro kaj nia amiko. Por tio Li parolas al ni, en homaj vortoj, kiujn ni povas kompreni, ni, kiuj estas kreitaj de Li laŭ Lia bildo. Pro tio, la muziko en kristana-juda tradicio ofte estas en ligo kun la vorto, en formo de kantoj kaj de kantataj preĝoj.

Instrumenta, senvorta muziko kaj eĉ danco, tamen ne estas laŭnature tute fremdaj al kristana maniero, glori Dion. Eĉ iu speco de spirita ekstazo, produktita per daŭra kantado aŭ longa ripetado de iuj preĝoj (ekzemple kun fervoro ripetitaj litanioj aŭ la rozario) povas helpi al homo, proksimigi sin al la mistero de Dio. Dio ja fariĝis homo, kaj nenio homa, antaŭ ĉio la korpo, estas fremda al Li (krom la peko).

Tial ankaŭ korpe-psikaj “teknikoj”, kiel longedaŭra kantado aŭ preĝado, povas esti akcepteblaj en kristana preĝado. Laŭ mi liturgio ne nepre devas esti kiel eble plej mallonga kaj konciza. Ĝi ja ne estu enuiga, sed ĝi povas esti longedaŭra, se pri tio estas iu konsento inter la plejmulto de la ĉeestantoj. Estas bone, preni al si tempon por Dio! Mi plurfoje spertis, ke homoj, kiuj origine ne volis vere malfermi sin al Dio, pro la daŭro de iu liturgio tamen iam transdonis sin al Li, kaj okazis al ilia animo granda liberiĝo. Tiu sintransdono estas la ĉefa celo de liturgio kaj preĝado ĝenerale. Ĝi povas okazi subite, en unu momento. Sed ofte la koroj bezonas tempon por “degeli”. Se oni preĝas kun tiu sincera sinteno, ke oni volas malfermi sin al Dio, preĝo povas esti longedaŭra, kaj ankaŭ ripeta. En tiu kazo ĝin ne trafas la kritiko de Jesuo el la Monta Prediko: (Mat 6,7) “Dum via preĝado ne vante ripetadu, kiel la nacianoj, ĉar ili supozas, ke ili estos aŭskultitaj pro sia multvorteco”. Kaj en la preĝado de Jesuo, kaj de la frua eklezio, ni havas ekzemplojn de longedaŭra preĝado. Sed gravas la motivo por longedaŭra preĝado: Oni ne pensu, ke per tia “laboro” oni impresus Dion, aŭ devigus Lin fari, kion oni volas de Li. Tio signifus malgrandan fidon al Dio, nia Patro, kiu “scias, kion vi bezonas, antaŭ ol vi petas de Li” (v.8). Sed per pli longa preĝado oni povas dum certa tempodaŭro resti proksima al Dio, kaj eĉ iomete forgesi la tempon. Laŭ ortodoksa kompreno, tio estas jam la komenco de la ĉielo, sed mi pensas, ke tute ĝenerale tio estus signo de bona liturgio! Kaj se ni trovis en liturgio iun unuecon kun Dio, niaj preĝoj kaj deziroj estos tre efikaj; Jesuo ja diras: “Se vi restadas en mi (…), petu kion ajn vi volos, kaj tio estos farita por vi” (Joh 15,7). Do ne temas pri fuĝo el la reala vivo, sed kune kun Dio ni vivas kaj influas la realan vivon.

Kristana liturgio alparolas ankaŭ la intelekton, ne nur la senton. Kristana preĝado ne nur estas emocia afero, ankaŭ intelekta. Tamen, speciale nia moderna eŭropa kulturo ofte tro emfazas la intelekton kontraŭ la korpo kaj la sentoj, kaj ofte ne havas sufiĉan ekvilibron aŭ unu tutecon de ambaŭ. Do estas kutima danĝero en liturgio, ke oni volas nur instrui al homoj iujn verojn intelekte kaj tro malmulte donas al ili eblecon, sperti tutece per la animo la proksimecon de Dio, per bona komuna kantado kaj preĝado.

*Stefan LEPPING, Germanio,*
*estrarano de IKUE*

## KREU FOJE SILENTON ĈIRKAŬ VI

Kiam vi foje havas “kvin minutojn” da tempo, ĉu vi scias, kion vi tiam faru? Nu – pensu! Kreu foje silenton ĉikaŭ vi! Elŝaltu vian radion, vian muzikilon. Elŝaltu vian televidilon, vian reklamlumon. Fermu viajn magazinojn, gazetojn, revuojn. Turnu la ŝaltilojn! Fermu la kranojn! Liberigu vin el la tentakloj de l' konsumsocio, kiu per la suĉteniloj de l' reklamoj kiel terura sepio elsuĉas de vi ĉiujn restaĵojn de libereco kaj spirito. Silentigu momente vian ĉirkaŭaĵon. Silentigu vian internon. Kaj mezuru la febron! Vi devas scii, kiom vi jam mortis, entombigita en la materio, en tiu premanta korseto de monavido, aĉetado, konsumado, profitado, konkurado, sekvado de la modo! Vi parolas, vi protestas dum miloj da kunvenoj. La malriĉuloj el la tria mondo, la malriĉuloj ĉe ni nenion gajnas per viaj interparoloj, diskutoj, protestoj kaj proponoj. Ĉi ĉio naŭzas ilin, ĉar ili scias, ke vi mem dronas en tio, kion ili malhavas! Ili taksos vin serioza nur tiam, kiam malaltiĝos via konsumada febro. Mi konas rimedon kontraŭ konsumada febro, verŝajne la nura rimedo – sobreco, asketismo!

*(Phil Bosmans: Ŝanco por feliĉo)*

# HISTORIAJ NOTOJ PRI KALWARIA ZEBRZYDOWSKA

## Sidejo de la IKUE-Kongreso 2013

Kalwaria Zebrzydowska estas unu el la pli vizitataj pilgrimlokoj en Pollando, pro la alveno de unu miliono da pilgrimuloj ĉiujare. Ĝi etendiĝas ĉe la monteto Żarek (je 527 metroj super la marnivelo), ĉe la deklivoj de Monto Lanckorona (je 530 metroj), je preskaŭ 44 kilometroj sud-okcidente de Krakovo kaj je 14 kilometroj oriente de Wadowice.

La tutaĵo de la pilgrimloko konsistas el barokstila baziliko dediĉita al la Madono de la Anĝeloj, el monaĥejo de la minoraj



fratoj, nomataj familiece en Pollando “bernardanoj”, kaj el kapeloj, kiuj staras en la spaco de 6 kilometroj, kun aspekto simila al tiu de la sanktaj lokoj de Jerusalemo. Ĝi estas specifa kopio de la Via Dolorosa de Jerusalemo, kun kapeloj por mediti pri la Pasiono de la Sinjoro kaj pri la Sekretoj de la Vivo de la Madono.

Laŭ la volo de la unua fondinto, Mikołaj Zebrzydowski, prizorgantoj kaj gardantoj de la pilgrimloko estas la bernardanaj fratuloj, per dokumento datita la 1-an de Decembro 1602.

La estiĝo de la pilgrimloko datiĝas de la 17-a jc., kiam Mikołaj Zebrzydowski, vojevodo de Krakovo, starigis sur monteto Żarek kapelon dediĉitan al la Krucumo de la Sinjoro, laŭ la modelo de la kapelo de la Sankta Kruco en Jerusalemo. La unuan ŝtonon oni metis la 4-an de Oktobro 1600 kaj la konsekro de la nova preĝejo fare de la papa nuncio Klaudiusz Rangoni kaj la episkopo de Krakovo, Bernard Maciejowski, okazis precize unu jaron poste, la 4-an de Oktobro 1601: ĝi devis utili al familio Zebrzydowski kiel preĝoloko dum la Karesmo.

Iom poste Mikołaj Zebrzydowski decidis starigi kapelon dediĉitan al la Tombo de la Sinjoro, ankoraŭ laŭ modelo de samnoma kapelo en Jerusalemo, kaj etan monaĥejon kun preĝejo, surbaze de projekto de la itala arkitekto, jezuito, Giovanni Maria Bernardoni kaj de la flandra arkitekto kaj oraĵisto Paolo Baudarth. La preĝejo dediĉita al la Madono de la Anĝeloj, estis konsekrita de la episkopo de Krakovo Piotr Tylicki ankoraŭ la 4-an de Oktobro, sed de la jaro 1609.

Intertempe, okazis plua kresko de la Kalvario ŝuldita al la influo, kiun la legado de libro pri la aspekto de Jerusalemo je la epoko de Kristo (libro verkita de Kristoforo Andricomio) havis sur Mikołaj Zebrzydowski: li do planis la konstruon de la stacioj de krucvojaj aŭ golgotaj vojoj pri la Pasiono de la Sinjoro, samaj al tiuj, kiuj estas en Jerusalemo. Al tiu ĉi ideo des pli instigis lin la simileco de la panoramo de liaj teroj kun la topografio de Jerusalemo. Tial, monteto Żarek estis nomata Golgoto; altaĵo ĉe Lanckorona, monto de la Olivarboj; alia, kie nun estas kapelo ‘Domo de Kajafas’, monto Ciono; la altaĵo, kie staros poste la ‘Palaco de Pilato’, monto Moriah kaj fine, rivero Skawinka ricevis la nomon Cedron. Ĉar la distancoj inter la lokoj estis pli grandaj ol tiuj en Jerusalemo, oni kalkulis la respektivajn proporciojn laŭ skalo.

En la jaroj de 1605 ĝis 1617 estis starigitaj sinsekve: Palaco de Pilato, Tombo de la Sinjoro Jesuo, Olivarba ĝardeno, Aresto de Jesuo Kristo, Domo de Anna, Domo de Kajafaso, Palaco de Herodo, Tombo de la Patrino de Dio, Domo de la Patrino de Dio, Krucumo, Ĉieleniro, Vespermanĝejo, Ko-

ro de Maria, Dua falo (okcidenta pordego), Sankta Rafaelo, Ermitejo de la 5 polaj fratoj kun kapelo de Sankta Maria Magdalena.

Kiam en 1620 Mikołaj Zebrzydowski mortis, la konstru-laborojn daŭrigis lia filo Jan Zebrzydowski, kiu starigis (1623-1641) la 5 kapelojn de la Pasiono (orienta pordego, kapelo sur Cedron, de la Unua falo de Jesuo, de la Kirenano, de Veroniko) kaj la ok marialajn kapelojn (1632), el kiuj 4 dediĉitaj al la Endormiĝo de Maria kaj 4 al ŝia Triumfo. Li krome pliampleksigis la kapelojn starigitajn de sia patro: Krucumo (1623) kaj Tombo de la Patrino de Dio (ĉ. 1623). Plie Jan Zebrzydowski konstruigis la t.n. "ŝtuparon" ĉe la Palaco de Pilato (1633) kaj la kapelon de la retrovo de la sankta Kruco kune kun la Ermitejo de sankta Helena (1623-1632).

Tria fondinto de la pilgrimloko estis Michał Zebrzydowski, filo de Jan. Dum lia vivo estis plivastigita la norda parto de la monaĥejo (1654-1655) kaj estis starigita kapelo ĉe la suda muro de la preĝejo (hodiaŭ ĝi estas la presbiteriejo) por konservi la miraklan portreton de la Patrino de Dio. La kapelo estas unu el la pli belaj arkitekturaĵoj de la tuta pilgrimloko.

En 1667, kun la morto de Michał Zebrzydowski, la proprietaĵon de la loko transprenis familio Czartoryski, ĉar la filinon de Michał - Anna - edzigis Jan Karol Czartoryski. Kaj kiam ankaŭ ŝi mortis, Jan Karol edziĝis por la dua fojo kun Magdalena de domo Konopacka, kiu prizorgis la plivastigon de la preĝejo, per plia navo (1702) kaj 2 turoj en la fasado (1720). Al la baziliko estis jam antaŭe aldonitaj du pliaj kapeloj: sankta Antono (1687) kaj Senmakula Koncipiĝo de la Sankta Virgulino (1749). La hodiaŭa baziliko estas ĉefe verko de Magdalena Czartoryska, kaj post ŝia forpaso en 1694, de ŝia filo Józef, kiu daŭrigis la konstru-laborojn.

En la jaroj 1810 ĝis 1812 la monaĥejon oni pligrandigis iom mallerte (pro la malaltigo de la volboj kaj ioma suprenlevo de la unuaetaĝaj muroj). Ĉi tiun rekonstruon oni korektis en la jaro 1897-1901 per la suprenlevo de la muro de la dua etaĝo kaj restarigo de la originalaj ornamaj formoj.

En la jaro 1906-1910 oni projektis ri-



markindan plivastigon de la hodiaŭa baziliko, sed la kuratoro de la kulturaj havaĵoj de Krakovo ne rajtigis la laborojn, motivante sian decidon per la aparte monumenta karakterizo de la tuta komplekso.

Kalwaria Zebrzydowska estas centro de la kultado de la Pasiono de Dio kaj de mariala kultado. La unua kulminas per la celebrado de la Padoj de Jesuo kaj la ritoj de la sankta Semajno. La mariala kultado datiĝas el la epoko de Mikołaj Zebrzydowski, kiu havigis la titolon Madono de la Anĝeloj al la ĉefpreĝejo kaj metis en ĝi la arĝentan statuon de Maria, aĉetitan en Loreto, Italio. Tiu kultado karakteriziĝas hodiaŭ ĉefe per la celebrado de la Padoj de la Patrino de Dio, per la procesioj de monato aŭgusto kaj per la respektego de la portreto de la Patrino de Dio de Kalwaria, tie konservata ekde 1641: la ekleziaj aŭtoritatuloj rajtigis ĝian publikan kultadon en 1656 atribuante al ĝi miraklajn eventojn. La 15-an de Aŭgusto

1887 la portreto de la Madono estis solene kronita en la t.n. "Valo de Josafato", fare de la episkopo de Krakovo Albin Dunajewski, fronte al miloj da pilgrimuloj.

Ŝajnas, ke Kalwaria estas la sola pilgrimloko en Pollando, en kiu konstante oni praktikas kultadon por la mortintoj. Ekde la duono de la 19-a jc. laŭ la Padoj oni celebras rekviemajn Mesojn, nomatajn 'Padoj por la mortintoj'. Dum la lastaj jaroj pli kaj pli oftiĝis Krucvojoj preĝintence de la forpasintoj.

Papo Johano Paŭlo la 2-a sentis grandan



ligitecon al Kalwaria, kiun li vizitis plurfoje, jam dum juneco kun sia patro. Dum sia papado li atingis Kalwaria'n plurfoje: okaze de la unua reveno al sia patrujo la 7-an de Junio 1979, kiam li donis la titolon "minora baziliko" al la preĝejo; la 14-an de Aŭgusto 1991 kiam, dum tre mallonga etapo en la urboplaco de la merkato, li benis la pilgrimulojn kaj loĝantojn de Kalwaria; kaj la 19-an de Aŭgusto 2002, je la fino de la solenadoj okaze de la 400-a datreveno de la konsekro de la loko, kiam li lasis oran papan krucon fine de sia lasta Meso en sia patrujo. Sed ankaŭ dum alia vojaĝo al Pollando Johano Paŭlo la 2-a montris sian ligitecon al Kalwaria: la 10-an de Junio 1987 en Krakovo li metis oran rozon ĉe la alportita portreto de la Madono de Kalwaria en la 100a datreveno de ĝia kronado.

La pilgrimlokon vizitis ankaŭ lia posteulo Benedikto la 16-a la 27-an de Majo 2006, retrairante la spurojn de Johano Paŭlo la 2-a.

Pro tio, ke Kalwaria Zebrzydowska konsistigas tute unikan monumentan, arkitekturan, pilgriman lokon, en 1999 ĝi estis listigata kiel Monda Kulturheredaĵo de UNESKO, post Banská Štiavnica (Slovakio, 1993) kaj antaŭ la Sanktaj Montoj de Piemonto kaj Lombardio (Italio, 2003).

## ORIGINO DE LA KALVARIOJ

La unuaj enpejzaĝaj pilgrimlokoj, lokoj dediĉitaj al la Pasiono de Kristo nomataj Kalvarioj, aŭ ankaŭ sanktaj Montoj, ekaperis en Eŭropo inter la fino de Mezepoko kaj komenco de Renesanco, kiel rezulto de historiaj eventoj kaj kulturaj evoluoj ligitaj ĉefe al la religia kulturo. Pro la influo de la Krucmilitoj, de socialaj movadoj kaj de ŝanĝiĝoj en la spiritualeco, ekkreskis speciala devoteco je la Pasiono de la Sinjoro. En ĉio tio aldoniĝis la malfacilaĵoj travivataj de la pilgrimuloj por atingi Jerusalemon sub la turka reĝimo. Entute, la ĉefa inspiro por la konstruo de Kalvarioj estis la deziro krei lokon, en kiu mediti pri la Pasiono de la Sinjoro kaj en kiu travivi memorpilgrimon al Jerusalemo.

La plej malnova Kalvario de Eŭropo estis starigita en la jaroj dudekaj de la 15-a jc.: monaĥejo Scala Coeli (Escalaceli), apud Kordobo en Hispanio, laŭ iniciato de la dominikano sankta Alvaro el Kordobo post lia reveno el la Sankta Lando. Iom pli poste aliaj Kalvarioj ekestis en Germanio (ekz. en Lubeko) kaj en Italio (ekz. la sankta monto de Varallo Sesia, en la tiama Duklando de Milano, j. 1493).

En la 16-a jc., dum la periodo de la protestanta Reformo, la starigo de Kalvarioj fariĝis malpli ofta kaj eĉ oni detruis kelkajn el ili en Germanio. La unika projekto, kiu kreskis, estis tiu de Varallo Sesia. Ankaŭ en la eŭropaj landoj kun ortodoksa plejmulto oni starigis ian korespondan formon de la Kalvarioj de la katolikaj landoj, kvankam por la orienta Eklezio ilia rolo estis malsama.

Nur post la fino de la Koncilio de Trento (1545-1563) reaperis la fervoro por la konstruo de Kalvarioj: la ĉefaj farantoj estis jezuitoj kaj franciskanoj. La motivoj tiam estis la klopodoj restarigi katolikismon, la rekomenco de la movado de la pilgrimoj, kaj pli malofte personaj motivoj de la fondintoj. En tiu ĉi periodo aperis Kalvarioj ĉefe en Pollando, Hungario, Slovakio kaj en la romkatolikaj teritorioj de Germanio.

Al la kresko de la devoteco al la Pasiono rimarkinde kontribuis fine de la 17-a jc. Andricomio per siaj verkoj en kiuj li priskribis la Sanktan Landon je la epoko de Jesuo.

En la periodo inter la dua duono de la 18-a jc kaj la duono de la 20-a jc. la konstruo de novaj Kalvarioj dependis de la interna politiko de la ŝtato kaj de la kuranta politika kaj religia situacio. Ilia starigo ligiĝis ĉefe kun religiaj motivoj, kvankam, kelkkaze, estis ankaŭ la espero, ke la Kalvario fariĝu loko por kunarigi lokan komunumon.

Post la 2-a mondmilito la Kalvariojn oni konstruis nur pro religiaj motivoj, emfazante ilian kompletigan rolon rilate al la marialaj pilgrimlokoj.

## LA KONGRESO DE IKUE EN KALWARIA ZEBRZYDOWSKA





De la 13-a ĝis la 20-a de Julio 2013 okazis en pilgrimloko Kalwaria Zebrzydowska en Pollando la 66-a Kongreso de IKUE. Partoprenis ĝin kvindeko da esperantistoj el naŭ eŭropaj landoj: Belgio, Ĉeĥio, Francio, Germanio, Hungario, Italio, Kroatio, Pollando kaj Slovakio. La ĉefa temo de la kongreso estis "Nova Evangelizado". La mesaĝon al la kongresanoj sendis la krakova kardinalo Stanisław Dziwisz, alta protektanto de la kongreso, kiu pro la okazonta Monda Renkontiĝo de la Junularo kun la Papo Francisko en la brazila urbo Rio-de-Ĵanejro ne povis esti celebranto de la esperantlingva sankta Meso por la kongresanoj en Krakovo.

Papo Benedikto la 16-a pasintjare lanĉis la "Jaron de la Kredo" kaj lia antaŭulo la beata Johano Paŭlo la 2-a instigis al nova evangelizado. La kongresanoj strebis primediti tion kaj por ĝia praktika realigo ĉerpi la spiritan forton dum la kongresa semajno.

Sabate la 13-an de Julio la kongresanoj atingis la kongresejon – la pilgrimlokon Kalwaria Zebrzydowska. Je la 18:30 okazis sankta meso en la kapelo de la Pilgrimdomo celebrita de la pastroj Stanisław Płachta, Józef Zielonka kaj Stanisław Płatek el Pollando kaj Bernhard Eichkorn el Germanio. Sekvis vespermanĝo kaj post ĝi, en la bazilika kapelo de la graca bildo de la Virgulino Maria, rozaria preĝo kune kun la ceteraj pilgrimantoj.

Dimanĉe la 14-an de Julio post la matena preĝo en la kapelo de la Pilgrimdomo kaj matenmanĝo okazis la inaŭguro de la

kongreso. Kadre de ĝi okazis du prelegoj. La unua preleganto estis Carmel Mallia el Malto, kies prelego “La Biblio kiel ekvojiro al Nova Evangelizado” estis realigita pere de skajpo fare de interreto. Post li sekvis prelego de la prezidanto de IKUE frato D-ro Giovanni Daminelli pri la temo “Edikto de Milano” *(v. paĝon 43).*


*D-ro Giovanni Daminelli*

La dimanĉa inaŭgura sankta meso okazis en la bazilika kapelo de Pasiono, kies celebrantoj estis la pastroj Bernhard Eichkorn, Józef Zielonka, Stanisław Płachta kaj Stanisław Płatek.

Posttagmeze okazis prelego de frato Inĝ. Jan Kalný pri “Sankta Faustyna Kowalska” antaŭ la vizito al ŝia sanktejo en Krakovo-Łagiewniki. Kaj post tiu ĉi prelego sekvis prelego de geedzoj Rita Rössler-Buckel kaj Franz-Georg Rössler el Germanio pri “Sanktulino Edit Stein”. Post la vespermanĝo okazis promena rozaria preĝo sub gvido de Miloslav Šváček, komencita antaŭ la statuo de la ĉiela patrono de la katolikaj esperantistoj la beata Johano Paŭlo la 2-a kaj finita ĉe la statuo de la Virgulino Maria meze de la pilgrimdoma korto.

La tuta lunda tago de la 15-a de Julio estis dediĉita al la tuttaga pilgrimo al la belega kaj historie tre grava urbo Krakovo. Preskaŭ dum la tuta ekskursa tago akompanis nin pluvo, spite de kiu tamen okazis la planita abunda programo. Helpe de ĉiĉerono la kongresanoj konatiĝis kun la plej gravaj historiaj lokoj de la urbo. Okazis vizito al la Episkopa Palaco forte ligita kun Papo Johano Paŭlo la



*Pilgrimdomo iĝis la kongresejo*

2-a, la tiama kardinalo Karol Wojtyła. Verdire la tuta kongresa semajno direktiĝis al omaĝo de tri gravaj personoj – la beata Johano Paŭlo la 2-a kaj sankta Maksimiliano Maria Kolbe, ĉielaj patronoj de IKUE, kaj sankta Faustyna Kowalska, heroldino de la Dia Mizerikordo. Proksime de la Episkopa Palaco situas la Baziliko de Sankta Francisko, ankaŭ forte ligita kun Papo Johano Paŭlo la 2-a. Dumvoje al la Baziliko de la Dipatrino sur la ĉefa placo estas necese almenaŭ mencii la fortikaĵon Barbakan kaj la iaman internacian komercan centron Sukienica kun urbodoma turo sur la ĉefplaco. Super la interno de la Baziliko de la Ĉielenpreno de la Plejsankta Virgulino Maria dominas mariana altaro de Wit Stwosz – unikaĵo el grandega valoro, la


*La kuncelebrantoj de la inaŭgura sankta meso (de maldekstre: sacerdotoj Józef Zielonka, Stanisław Płatek, Bernhard Eichkorn kaj Stanisław Płachta).*

plej granda altaro en Eŭropo. Sekvis vizito al monteto Vavelo, kiu estas la plej grava monumento de la polaj historio kaj kulturo. La unuan templon tie fondis en la jaro 1000 reĝo Boleslao la Brava. La nuna masonita



*Iom da ripozo inter abunda programaro*

Reĝa Katedralo en Vavelo konsekrita al S-taj Stanislao kaj Venceslao estis finkonstruita en la jaro 1364. En la katedrala kripto oni povas ankaŭ viziti tombon de la pola prezidento Lech Aleksander Kaczyński kaj de lia edzino Maria Helena Mackiewicz-Kaczyńska, tragike mortintaj en aviadila akcidento apud Smolensk en Rusio la 10-an de aprilo 2010.

Interesa estis la vizito al la ĵus konstru-



*Pilgrime al Krakovo-Łagiewniki*

ata grandega konstrukomplekso de Centro de Johano Paŭlo la 2-a nomata: "Ne timu!". En tiu sanktejo okazis sankta meso, celebrita de pastroj Stanisław Płachta, Roman Gmyrek kaj Stanisław Płatek. Post vizito al la muzeo de Johano Paŭlo la 2-a sekvis vizito al Krakovo-Łagiewniki, ligita al sankta Faustyna Kowalska, apostolino de la Dia Mizerikordo. Interesa estas la tiea Baziliko, kiun Papo Johano Paŭlo la 2-a, kune kun la mondo, konsekris al la Dia Mizerikordo la 17-an de Aŭgusto 2002 Spite de la ofta pluvo la pilgrimo al Krakovo iĝis neforgesebla travivaĵo.

La marda mateno estis dediĉita al la sankta meso en la kapelo de la Pilgrimdomo celebrita de la pastroj Gmyrek, Zielonka, Płachta kaj Płatek. La antaŭtagmeza tempo estis dediĉita al ĝenerala kunsido de IKUE finita per Anĝeluso.

Posttagmeze okazis prelego pere de skajpo de s-ro Vitor Luiz Rigoti dos Anjos el Brazilo pri "Evangelizado en kelkaj misiaj kampoj de Meksiko, Afriko kaj Brazilo".



*La Baziliko de la Dia Mizerikordo en Krakovo - Łagiewniki ligita kun sankta Faustyna*

Post li prelegis pastro Roman Gmyrek pri "Sankta Hildegarda el Bingen". Vespere okazis en la Baziliko de Kalwaria Zebrzydowska orgenkoncerto fare de la kongresano – frato Stefan Lepping el Germanio. La pli granda parto de la koncerto estis multfaceta muzika rezonado pri la melodioj kaj ties tekstoj, kiu montris la tutan skalon de la orgenaj sonoj. La marda tago estis finita per la rozaria preĝo en la Baziliko.

Merkrede la 17-an de Julio post la matena preĝo kaj matenmanĝo okazis prelego de fratino Marija Belošević pri "Nova

evangelizado kaj modernaj komunikiloj”, poste sekvis prelego de frato Stanisław Śmigielski pri “Fenomeno de Radio Maryja en Pollando en la evangelizado de la kristanoj”. Kaj kiel lasta prelegis pere de



*En koncentrejo Auschwitz - Oświęcim*

skajpo Mons. Gabriel Anda el Kamerunio pri “Nova evangelizado – tasko de ĉiu kristano”. La prelega programo estis finita per Anĝeluso.

Posttagmeze okazis vizito al la sanktejo kun ĉiĉeronado. Post ĝi ni preĝis la sanktan rozarion en la Baziliko kaj sekve en la kapelo kun mirakla bildo de la Virgulino Maria okazis la sankta meso, celebrata de pastroj Płatek, Płachta kaj Gmyrek.

La tuta ĵaŭda tago estis dediĉita al perbusa pilgrimado. Unua celo de la pilgrimado estis koncentrejo Auschwitz (Oświęcim). En la koncentreja “bloko 11” estis martirigita ankaŭ sankta Maksimiliano Maria Kolbe, proponinta sin al mortpuno anstataŭ alia malliberulo, patro de familio. En la mortĉelo, en kiu per malsato mortis naŭ kunarestitoj, la vivo de la deka – Maksimiliano Kolbe estis finita per mortiga injekto.



*En la mortĉelo de S-ta Maksimiliano Kolbe*

Nome de ĉiuj kongresanoj florbukedon sur la lokon de la morto de sankta Maksimiliano Maria Kolbe metis la vicprezidantoj de IKUE – fratino Marija Belošević kaj Miloslav Šváček. La brulanta kandelo estis starigita al la muro, antaŭ kiu estis mort-



pafitaj multegaj prizonuloj. Sekvis akompane de ĉiĉeronino vizito al pluaj blokoj kaj ceteraj lokoj de tiu surtera infera loko.

Sekvis vizito al la Centro de Sankta Maksimiliano Maria Kolbe en Harmęże ĉe Oświęcim prizorgata de la Franciskana Ordeno kaj Misiistinoj de la Senmakula de Patro Kolbe. La Centro de Sankta Maksimiliano Kolbe estas kunigita kun preĝejo de la Senmakula Virgulino Maria. En la Centro troviĝas multaj pentraĵoj de Marian Kołodzej (6.12.1921-13.10.2009), eksmalliberulo de la koncentrejo Auschwitz n-ro 432, scen-artisto, kiu per siaj pentraĵoj esprimis la drastan vivon en la koncentrejo.



*La Baziliko de Oferdono de la Plejsankta Virgulino Maria, paroĥa preĝejo, en kiu estis baptita Johano Paŭlo la 2-a*

Poste sekvis vizito al Kęty, kie en la kapelo de la Kongregacio de la Fratinoj de la Resurekto de Nia Sinjoro Jesuo Kristo okazis preĝo ĉe la tomboj de beata Celina Borzęcka kaj de ŝia filino Diservantino Jadwiga Borzęcka. Fratulino de tiu kongregacio rakontis pri la vivo de ambaŭ virinoj. La beatproklamo de Celina okazis en la Baziliko de Sankta Johano ĉe Laterano en Romo la 27-an de Oktobro 2007. Beata Celina apartenis al la rara grupo de virinoj, kiuj spertis diversajn statojn de la vivo: edzino, patrino, vidvino, religiulino kaj fondintino. Ŝian vivon karakterizas ŝia eldiraĵo: "Dio ne vokis min fari eksterordinarajn aferojn, eble, ĉar Li ne volis, ke mi fariĝu orgojla. Mia vokiĝo estis plenumi la volon de Dio fidele kaj ame".

Daŭrigante la pilgrimon ni haltis en Andrychów por tagmanĝo en restoracio. Post tio ni atingis Wadowice – naskiĝlokon de la beata Papo Johano Paŭlo la 2-a. En la Baziliko de Oferdono de Maria Plej Sankta Virgulino, kiu estas paroĥa preĝejo, okazis la sankta meso celebrita de pastroj Gmyrek, Płachta kaj Płatek. En la Baziliko troviĝas baptujo, ĉe kiu estis baptita Johano Paŭlo la 2-a. La bapto okazis la 20-an de Junio 1920 en la 33-a tago de la vivo de Karol Józef Wojtyła, filo de Karol kaj Emilia Wojtyła. La baptujon Karol Wojtyła kisis dufoje: la 18.5.1970 kiel kardinalo kaj metropolito de Krakovo en sia 50-a naskiĝdatreveno, la duan fojon la 7.6.1979 kiel Papo Johano Paŭlo la 2-a dum sia unua pilgrimo al la Patrujo.

Post la sankta meso okazis vizito al la apuda Muzeo de Johano Paŭlo la 2-a, nomata "Familia Domo de Johano Paŭlo la 2-a" kun ekspozicio "Trezoro de mia vivo". Ĝi estas repliko de lia familia domo, ĉar



*La celebrantoj en la Baziliko de Wadowice: sac. S. Płachta, S. Płatek kaj R. Gmyrek.*

la origina familia domo estas ĉi-momente rekonstruata. Kaj ankoraŭ estis disponigita tempo por trarigardo de la urbo.

Dum revena vojaĝo atendis la kongresanojn surprizo – halto en la Kulturdomo en Zagórnik, kie okazis belega folklora

programo de ensemblo el Andrychów. Post tiu ĉi ripoziga kultura programo sekvis



*Folklora programo en Zagórnik*

plua surprizo – vizito al la Baza Lernejo kaj Gimnazio de Ludoviko Lazaro Zamenhof en Zagórnik.

Post reveno je la 22-a horo atendis la kongresanojn saketoj kun vespermanĝo. Ne tiom la manĝaĵo kiom la trinkaĵo el ili estis tre bezonataj. Post spiritriĉe travivita tuttaga pilgrimo sekvis agrabla momento – la enlitiĝo.

Vendrede matene okazis sankta meso en la kapelo de la Pilgrimdomo. Post la matenmanĝo estis tri programeroj. Unue pere de skajpo prelegis el Pécs, Hungario, la dioceza kanceliero pastro Attila Szép pri "Nova evangelizado – leteroj el la episkopara sinodo". Post li prelegis fratino Marija Belošević el Kroatio pri "Mar-



*La kongresanoj dum Kalvaria Krucvojo*

tiroj de la 20-a jarcento". Kaj fine estis projekciita prezentaĵo de frato Miloslav Šváček pri la pasintjare okazinta 65-a IKUE-Kongreso en urbo Pécs, Hungario. La antaŭtagmeza programo estis finita per Anĝeluso.

Posttagmeze tiuj, kiujn ne timigis peniga piediro, partoprenis en la Kalvaria Krucvojo de Jesuo Kristo, kiu en la tereno de Kalwaria Zebrzydowska daŭris iom pli ol du horojn. Kaj vespere okazis jam tradicia adiaŭa kongresa programo, en kiu partoprenis per siaj prezentaĵoj la kongresanoj el apartaj landoj.

Alproksimiĝis sabato – la tago de la adiaŭo. Per la lasta sankta meso la kongresanoj dankis al Dio kaj al la Virgulino Maria – forte honorata en la pilgrimloko Kalwaria Zebrzydowska – pro ĉiuj ĉielaj gracoj, benoj kaj ŝirmoj dum la tuta belega kaj spiritriĉa kongresa semajno travivita en amikeca kaj frateca amo, sen konfliktoj aŭ aliaj malagrablaĵoj.



*Danko al ĉefaranĝantino Marija Belošević*

Tre kora danko apartenas al fratino Marija Belošević, vicprezidantino de IKUE kaj ĉeforganizantino de la kongreso kaj al ĉiuj, kiuj iamaniere helpis en preparlaboroj de la kongreso kaj dum ĝi.

Dio repagu al ili ilian strebadon, por ke la kongreso la kongreso ne estu nur agrable travivitaj tagoj, sed ke ili estu vera kontribuo en la Jaro de la Kredo kaj laŭ la senco de la kongresa ĉeftemo "La Nova Evangelizado". Tiusence ni daŭrigu niajn aktivadojn en niaj hejmoj, en niaj landoj.

Kaj se tia estos la volo de Dio, do, ĝis la revido dum la venontjara kongreso en la belega itala urbo Trento. *Miloslav Šváček*

# IKUE-RENKONTIĜO EN MARIANKA ĈE BRATISLAVA

En pilgrimloko Marianka ĉe Bratislava okazis de la 17-a ĝis la 19-a de Majo 2013 renkontiĝo de la katolikaj esperantistoj, organizita de la Slovaka IKUE-Sekcio. Partoprenis ĝin esperantistoj el Ĉeĥio, Slovakio, Hungario kaj Pollando.



*Dum iom peniga Kalvaria Krucvojo*

Vendredon, post loĝigo en spiritekzerca domo, la alvenintoj eluzis la tempon por konatiĝo kun tiu ĉi fama pilgrimloko. Vespere la ĉeestantoj partoprenis en la Baziliko de Naskiĝo de Virgulino Maria kun ceteraj pilgrimantoj kaj paroĥanoj majan piaĵon honore al la Virgulino Maria – Reĝino de Majo kaj la sanktan meson. Post vespermanĝo okazis projekciado pri la 65-a Kongreso de IKUE 2013, okazinta en la hungara urbo Pécs kaj pri la IKUE-renkontiĝo 2011 en Nitra.

Sabaton post la sankta meso la tiea pastro el la Kongregacio de la Fratoj Konsolantoj el Getsemano konigis al nia esperantista grupo la historion de la pilgrimloko. Poste okazis meditoj ĉe ĉiuj 14 stacioj de Kalvaria Krucvojo lokita en natura scenejo de la arbara deklivo, unika en Slovakio. Post tagmanĝo okazis jarkunveno de Slovaka IKUE-Sekcio, kiu elektis por plua balotperiodo sian novan prezidanton – fraton Pavol Petrík. Poste sekvis ekskurso al la slovaka ĉefurbo Bratislava.

La vespera programo konsistis el vizito de Lurda Groto kun litanio kaj kantado honore al la Virgulino Maria. En la kapelo de la spiritekzerca domo poste oni preĝis la rozarian preĝon kaj kantis.

Dimanĉon, je la festo de la Sankta Spirito, la ĉeestantaj esperantistoj partoprenis en la solena sankta meso en la baziliko kun ceteraj pilgrimantoj kaj paroĥanoj. Post ĝi okazis prelego de frato Pavol Petrík okaze de la 1150-jara datreveno de la alveno de la kredheroldoj sanktaj Cirilo kaj Metodio en Grandmoravian Regnon. Kadre de tiu ĉi memoriga datreveno sekvis projekcio pri la 59-a kongreso de IKUE okazinta en la jaro 2006 en Velehrad, la plej grava sidejo de sanktaj Cirilo kaj Metodio. Post tagmanĝo okazis la fermo de la bela tritaga renkontiĝo de la katolikaj esperantistoj en Marianka.

Koran dankon al fratino Mária Beláňová kaj ĉiuj, kiuj aktive kunlaboris. Denove plifortiĝis la deziro, ke la renkontiĝoj de la katolikaj esperantistoj okazadu ĉiam alterne



*Graca statuo de V. Maria en Marianka*

en Ĉeĥio kaj Slovakio. Revivigo de tiu ĉi iama tradicia praktikado estas bonveninda ideo precipe por tiuj esperantistoj, al kiuj la ĉiam pli malfacilaj vivkondiĉoj ne permesas partopreni en la kongresoj.

Dankon al Dio, al la Virgulino Maria kaj al la organizantoj de la renkontiĝo pro la agrablaj tagoj en Marianka.

*Miloslav Šváček*

## FORPASIS LONGJARA FIDELA MEMBRO DE IKUE
## FRATO FRANTIŠEK ADAMÍK



La 5-an de Julio 2013 en la aĝo de 81 jaroj mortis multjare fidela membro de IKUE frato František Adamík, loĝinta en urbo Přerov, Ĉeĥio. La 10-an de Julio 2013 okazis en la preĝejo de sankta Mikaelo en Přerov la lasta adiaŭo kun frato Francisko. Ĉefcelebranto de la funebra sankta meso estis lia filo – jezuito Jan; kuncelebris 14 pastroj.

Dum la periodo de komunisma totalismo reganta en la iama Ĉeĥoslovakio ne ekzistis eblo eldonadi kaj aĉetadi religian literaturon. Eĉ la tiama "Katolické noviny" (Katolika Gazeto) ne havis eklezian aprobon. Kiel "Rudé právo" (Ruĝa Rajto – komunista taggazeto), tiel ankaŭ la Katolika Gazeto estis subordigita al la sama ideologia cenzuro. Tial estis sekrete multobligata diversa religia literaturo, libroj kaj broŝuroj, originaloj kaj tradukaĵoj, revuoj kaj la gazeto "Informace o církvi" (Informoj pri la eklezio) per simpla prestekniko helpe de ciklostilo, eventuale per pli simpla tekniko per sistemo "kadreto – rulilo" (por frato Francisko Adamík ilin pretigis mi). Ĉar tiu ĉi aktivado ne plaĉis al ateistaj ideologoj, la presistoj estis persekutataj kaj malliberigitaj fare de la fifama komunista ŝtata polico.

Tiu sorto trafis ankaŭ fraton František Adamík el Přerov. Post du domtraserĉoj sekvis demandesploradoj kaj akuzo pro kulpo de "subfosado de respubliko". Je prilaboro de lia defendo partoprenis JUDr. Ján Čarnogurský el Bratislava, kies merito estas tio, ke la informoj pri tiu ĉi kazo atingis ankaŭ eksterlandon. Tiel la centro de la Kristana Internacia Solidareco en Zuriko eksciis ne nur pri František Adamík, sed ankaŭ pri ceteraj persekutatoj en Ĉeĥoslovakio.

Sekvis diversaj peticioj kaj protestleteroj adresitaj al la ŝtatprezidento Gustáv Husák, al la Registaro, al la Plej Supera Tribunalo, al la Ministerio pri Justico kaj al aliaj lokoj, kie oni povis esperi almenaŭ etan pozitivan rezulton favore al la persekutatoj kaj juĝatoj pro la kredo. Tiu ĉi aktivado donis fruktojn.

Ekde la jaro 1992 aktivas CSI ("Kristana Internacia Solidareco"), fondita de frato František Adamík, ankaŭ en la Ĉeĥa Respubliko (www.csi-cr.cz).

Kun frato Adamík mi interkonatiĝis komence de la 70-aj jaroj de la pasinta jarcento; tiam ni ambaŭ engaĝiĝis en la kaŝe aktivanta tria ordeno de sankta Dominiko; komence de la 50-aj jaroj komunistoj likvidis ĉiujn ordenojn, kiuj povis reaktiviĝi nur post 40 jaroj, post la falo de la ruĝa drako en 1989. Li tiam esperantistiĝis kaj membriĝis al IKUE. En 1975 li kun sia familio partoprenis en la katolika (IKUE) tendaro okazinta en vilaĝo Herbortice (en 1977 perforte fare de invado de komunista polico la tendaro estis likvidita). Dum la jaroj 1976 ĝis 1978 li estis prezidanto de E-klubo en Přerov. En 1978 mi kun li organizis kurson de Esperanto en klubejo de Popolpartio, kiu pro ordono de la tiamaj regantoj devis esti ĉesigita. Ambaŭ ni travivis la saman sorton – la juĝon, li pro sekreta presado kaj disvastigado de la religia literaturo, mi pro organizado de la katolikaj E-tendaroj dum totalisma sistemo. Ambaŭ ni spertis fortan helpon de la Sankta Spirito en la lukto kontraŭ neimageble pli forta tiama antagonismo – la totalisma reĝimo. Ĝis la lasta vivmomento frato František Adamík estis fidela membro de IKUE kaj dum kelkaj jardekoj mia proksima kunaktivanto.

Sinjoro, dankon pro lia laboro favore al la persekutatoj, pro lia fidela aparteno al IKUE. Ripozon eternan donu al li, Sinjoro, kaj la senfina lumo lumu al li, li ripozu en paco. Amen.

*Miloslav Šváček*